# *Akceptis Raúl Castro la ?efministron de Sankta Kristoforo kaj Neviso.*



La  prezidanto de la ?tata konsilantaro, generalo de armeo Raúl Castro, akceptis en Havano la ?efministron de la federacio de Sankta Kristoforo kaj Neviso, Denzil Llewellyn Douglas, kiu plenumas oficialan laborviziton en Kubo ekde la pasinta lundo. Dum la renkonti?o amba? gvidantoj dialogis pri la reciprokaj rilatoj kaj aliaj temoj internaciaj kaj regionaj kiuj interesas amba? landojn.
Flanke de Kubo anka? partoprenis la dialogon la ministro pri eksteraj rilatoj, Bruno Rodríguez Parrilla kaj la ministro pri ekstera komerco kaj fremdaj investoj, Rodrigo Malmierca.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/26702-akceptis-raul-castro-la-cefministron-de-sankta-kristoforo-kaj-neviso

**Radio Habana Cuba**